**SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO**

# Aktuale

## SEJM

Esperanto servu pacon!

# A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1977/78 N-1(45) Aŭgusto - septembro

## KONCIZA PROTOKOLO
## DE LA 11-A KONFERENCO DE SEJM-KONSILANTARO

### La unua tago - 13.8.77.

La oficiala malfermo de la 11-a SEJM-Konferenco, dediĉita al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobro, okazis en Poltava Kulturpalaco de sindikatoj.

Laŭ komisio de SEJM-Komitato la Konferencon oficiale malfermis prezidanto de Poltava urba E-klubo V.Grigorenko.

Vicprezidanto de SEJM D.Cibulevskij dankis la mastrojn de la Konferenco kaj OkSEJT-19 kaj enmanigis honorlibron al estraro de la Kulturpalaco.

La Konferencon salutis V.Kulikov (Omsk), V.Sibircev (Novosibirsk), V.Bespalov (Soĉi), B.Tokarev (Moskvo), L.Goreva (Ivanovo).

Fine de la malferma ceremonio salutparolis direktorino de la Kulturpalaco k-dino Rabotina J.F.

Temo: Analizo de Decidoj de la 10-a Konferenco.

P.Jegorovas voĉlegas la Decidojn, ellasante la konstatajn kaj komentante la plenumendajn: 17.-18. - temos aparte dum pridiskuto de la faka agado; 21. - faris nur kelkaj kluboj; 22. - plenumita; 23. - okazis nur "E. kaj naturo" ; 25. - la fako estas fondita; 26. - aperis en "A"; 27. - farita; 29. - estas; 30. - plenumis nur malmultaj kluboj; 31. - oni malmulte atentis tion; 32. - same; 34. - farita kun prokrasto; 35. - la fako laboris; 36. - "Kurte" aperadis regule; 37. - ne plenumita; 38. - dume pri tio ne temas; 39. - estas; 40. - la vicprezidanto ne laboris; 41. - farita; 42. - ne observita pro eksteraj kaŭzoj; 44. - okazis; 47. - temos aparte; 48. - farata; 50. - estis en OrSEJT; 51. - ne farita; 57. - la rubriko ne aperadis; 58. - estis provoj.

Temo: Peresperanta soci-utila laboro de SEJM-kluboj.

V.Samodaj: Ofte oni propagandas Esperanton, sed ne montras ĝian utilon por la socio. Tial aperas impreso, ke ni ne estas bezonataj por la socio. La laboro limiĝas interne de la kluboj, nenion donas al la socio. Se ni volas, ke lokaj instancoj subtenu nian laboron, ni trovu eblecojn fari ion utilan por ili, laŭ/eble aktivi en ilia sfero. Do la esperantistoj devas nepre partopreni la ĝeneralan socian vivon. Se ni faras ion interesan, necesas pri tio informadi, interesigi la oficialulojn. Ni kunlaboru kun lokaj asocioj de amikeco, kun la packomitatoj, laŭeble membriĝu tie. E-kluboj de internacia amikeco estu prefere ne apartaj, sed en kadroj de ĝeneralaj KIA. Ni devas trovi vojojn por pliviglig̃o de la kontaktoj kun ĝemelurboj. Necesas provi enigi E-istojn en amikvizitajn delegitarojn kaj grupojn. Konkretaj formoj de soci-utila laboro dependas de lokaj cirkonstancoj, inkluzive personecon de la respondecaj funkciuloj. Eblas uzi stimulan helpon el eksterlando.

V.Aroloviĉ: Pasis 4 jaroj post la subskribo de la kontrakto inter Monda Packonsilantaro kaj MEM. Ĉu ĝis nun SEJM-kluboj sufiĉe uzis tion por kontaktoj kun lokaj packomitatoj?

V.Samodaj: Tiaj kontaktoj mankas en centro, des pli malfacile estas starigi ilin surloke. Tamen la kluboj devas serĉi iujn formojn de kunlaboro.

T.Bercis: Antaŭ jaro rigaj E-istoj starigis bonajn kontaktojn kun sindikatoj. Ili petis de ni helpon por establi ligojn kun eksterlando. Dume ni ne multe sukcesis, sed intencas reprovi.

M.Bronŝtejn: Sen soci-utila laboro klubo ne povas ekzisti. Ni kunlaboras kun uzinaj instancoj. Ni faras prelegojn pri E., pri internacia kultura vivo, pri eksterlanda junulara movado, organizas koncertojn. Krome, ni aranĝas grandajn ekspoziciojn, ekz. de politikaj afiŝoj. La kluboj devas interhelpi pri similaj aferoj pere de SEJM.

V.Sibircev: La temo estas ege aktuala. Necesas kompili liston de fareblaj soci-utilaj laboroj. En Novosibirsk ni havas bonajn kontaktojn kun la urba arkivo. Ĉiujare ni liveras al ĝi materialojn de nia klubo.

D.Kolker: Al ni oni proponis en la packomitato helpi en dissendo de nacilingvaj -literaturaĵoj, sed ni ne atentis tion. Krome mi ricevis materialon el Ĉeĥoslovakio, sed bedaŭrinde ne uzis ĝin.

L.Kovalenko: Ni havas grandajn eblecojn lige kun la 60-jara jubileo de Oktobro. El diversaj landoj ni ricevis petojn pri helpo por la jubileaj ekspozicioj. Ni turnis nin al gorkomo de komsomolo, poste al la partia, kaj ricevis promeson helpi. Nun omskanoj mem intencas fari la jubilean ekspozicion.

G.Gercikov: Ni devas reklami nian agadon. La kluboj ricevadas multajn interesajn materialojn el eksterlando, kaj necesas utiligi ĝin. Devas esti migrantaj ekspozicioj tra tuta Sovetio. Ni devas prelegi pri internacia laboro, internacia amikeco.

L.Kovalenko: Tiaj migrantaj ekspozicioj povas esti fakaj, ekz. "E. en biologio", "E.en geografio" ktp.

S.Gaidamaviĉius: Eblas disdoni temojn al diversaj kluboj.

B.Tokarev: En la kontaktoj kun oficialuloj ni estu ne tede insistaj, sed ekstreme ĝentilaj. Se iu mistraktas E-on en la gazetaro, ni evitu tro akrajn reeĥojn, kiuj povus nur malutili.

A.Urdajev: Krasnojarska klubo kolektis infandesegnaĵojn, sendis al Japanio, Jugoslavio. La klubo regule raportadas al gorkomo de komsomolo. En Kulturpalaco estas anonco, ke interesiĝantoj povas demandi pri E. en certaj horoj. Ni kontaktas ankaŭ kun la societo "Scio".

T.Bercis: Eblas prepari materialojn pri famuloj de sia respubliko kaj rondsendi al la kluboj.

G.Gercikov: Ni estu ĝentilaj, sed esprimi nian opinion, se oni misinformas pri E., ni devas.

V.Cvetkova: Ni ne forgesu pri la ĉi-jara Kongreso de sindikatoj, pri propagando de ĝiaj decidoj.

D.Kolker: Multaj dediĉas sin al tradukado, ekz. de scienc-fikciaĵoj. Sed eldoni la tradukojn dume ne eblas. Do ĉu tia laboro estas soci-utila aŭ ne? Necesas precizigi.

A.Melnikov: Devas temi nur pri tiuj laboroj, kiuj postulas certajn paŝojn antaŭ la instancoj. Pri migrantaj ekspozicioj okupiĝu nur fortaj kluboj, ĉar tio estas temporaba afero. Lastatempe en SSOD akumuliĝis iuj negativaj materialoj pri apartaj E-istoj. Ĉu ni eble klopodu, ke venu pozitivaj reeĥoj pri nia agado?

V.Samodaj: Tio certe utilus, kaj gravas, ke tiaj reeĥoj venu el diversaj landoj. La kluboj pli aktive mendu ĉe SSOD abonojn kaj aliajn E-aĵojn por kluba uzo.

A.Melnikov: Abonojn prefere oni mendu rekte ĉe CAZI (la adreso

Temo : Faka agado en SEJM.

V.Sapoĵnikov (skriba raporto). Dum la agadjaro pro personaj malfavoraj cirkonstancoj ĉe mi multe da tempo perdiĝis kaj mi ne sukcesis plene realigi la individuan laborplanon. Tamen mi metis ĉiujn fortojn por ne ĉesigi la agadon kaj resti sur la posteno laborante.

Komencinte gvidadon de la faka sistemo de SEJM, mi ne dubis, ke kapablos ĝin gvidi. Sed antaŭvideblis malfacilaĵoj, ĉar: 1) mi ne estis bone konata kun stato de la aferoj en la fakoj kaj servoj; 2) mi ne havis bonan komprenon de miaj taskoj sur la posteno; 3) mi ne havis bazon por gvidado, ĉar miaj antaŭuloj nenion al mi donis - eĉ ne unu papereton.

Mi konsideras la trian plej grava, ĉar mi ne havis eblecon por konatiĝi kun sperto de la aliaj. Krome mi ne tuj komprenis specifecon de la agado en la Komitato. Do mi jam en la komenco de mia raporto konkludas: oni ne devas akcepti la aferojn kaj komenci agadon sur la posteno, se la antaŭulo ne preparis necesan dokumentadon.

Nun mi analizos plenumon de mia individua laborplano en la Komitato:

1) Helpi en ellaborado de speciala kriteriaro por socialisma konkurado de fakoj kaj servoj (kun Jegorovas). Kelkfoje dum la jaro mi provis iel pripensi la projekton de la kriteriaro, sed senrezulte. Malhelpas diverseco de la fakoj kaj servoj. Fine de la jaro mi sendis al Paŭlo miajn konsiderojn pri la demando, sed la respondon ne ricevis. Mi skribis pri la problemo ankaŭ en mia lasta artikolo por "Aktuale", sed ĝi ne trafis tien, ĉar malfruiĝis. (La artikolo estis retajpita kaj pendis sur la konferenca anonctabulo dum tuta daŭro de la Konferenco. - La red.)

2) Kompili kalendaron de fakaj renkontiĝoj kaj aperigi ĝin en "Aktuale". Mi kompilis ĝin, sed la Komitato decidis ĝin ne aperigi, ĉar ĝi estas tro magra kaj fakte nenion donas en informa senco.

3) Kontroli formadon de fakaj laborgrupoj. Fakte mi povas diri kaj "jes" kaj "ne". Ĉar se la fakestroj laboris, la grupoj aperadis; se ne - neniuj cirkuleroj helpis. Tion mi bone vidis.

4) Esplori eblecon pri fondo de la interlingvistika fako de SEJM (kun Arolovič). Dank' al energio de Viktoro kaj aliaj komitatanoj la fako fondiĝis. Ĝia apero estas tre aktuala, elekto de B.G. Kolker por la estreco - plej trafa paŝo.

5) Kontroli ellaboron de la unueca programo por paroligaj periodoj (kun Gilinskij). Mi ne partoprenis ĉi tiun laboron, ankaŭ Gilinskij. S.V.Smetanina ne respondadis al miaj leteroj. La programon ŝi (oni diras) ellaboris.

6) Kolekti raportojn pri laboro de la fakestroj por la agadjaro. Mi ja kolektis, sed ili ne tre volonte sendis. Pli ol duono de la fakestroj raportis nek por la unua, nek por la dua duono de la agadjaro. Miaj leteroj ne helpis al la afero.

7) Kolekti laborplanojn de la fakestroj por la agadjaro. La iniciato ne sukcesis: nur kelkaj fakestroj ellaboris la planojn.

8) Helpi al la fakestroj en varbado de la kunlaborantoj. Organizi la kampanjojn. Krom 2 - 3 fakestroj, la aliaj fakte nenion faris por varbi la kunlaborantojn. Unue, neniu al ili proponis kunlaborantojn. Due - preskaŭ neniu SEJM-ano povas certe diri, ke li kapablas labori en tiu aŭ alia fako. Oni devas subteni lin, kuraĝigi. Ekzemple: dum nura duonhoro mi, rakontinte pri la kolektanta fako de SEJM, varbis en nia klubo 14 membrojn! Kaj por ĉiu fako kaj servo en nia klubo povos troviĝi minimume 1 - 2 kunlaborantoj. Tio ĉi montras al ni, ke ni nesufiĉe propagandas la fakojn kaj servojn en la kluboj (kulpas SEJM-reprezentantoj, klubgvidantoj kaj aktivuloj). La fakestroj devas strebi ĉi-flanke aktivecon de la aktivularo kaj propagandi sian fakon (servon). Ni metu finon al relativeco en la

aferoj! Necesas konkrete scii, ke la fako havas tiom da kunlaborantoj (almenaŭ po unu E-isto de ĉiu SEJM-klubo).

9) Konsiderante la propagandan laboron la plej ĉefa, efike helpi al ĝia organizo kaj agado. Mi faris ĉion, kion povis. Korespondante kun A;Medinŝ, mi eldiris miajn opiniojn kaj vidpunktojn pri la komenca etapo de la laboro.

10) Helpi al organizantoj de OrSEJT-19. La korespondado kun la Prepara Komitato de OrSEJT-19 estis vigla, kaj mi dankas al L.Novikova pri bona kaj ĝustatempa informado. Tiamaniere mi povis ĝustatempe kontakti kun la necesaj funkciuloj (precipe SEJM-komitatanoj) kaj ni kune plenumis plene la preparplanon de la tendaro.

11) Kontroli plenumadon de SEJM-Konferencaj decidoj pri fakoj kaj servoj, precipe la sekvajn:

a) eldonado de nova kantaro de SEJM. Mi nenion faris ĉi-flanke, ĉar A.Vizgirdas ne respondadis al miaj leteroj.

b) eldono de gvidlibro por tradukado. Verŝajne V.Ebel ne taŭgas por verki la libron - tion mi konkludis el paroloj kun li. Necesas trovi alian, pli spertan respondeculon.

c) kontaktoj kun E-veteranoj (kolektado de historiaj E-materialoj, memoraĵoj). Bedaŭrinde, mi preskaŭ nenion havis por kontroli, ĉar ĉi-flanka laboro ne estis organizita. Tamen Krasnojarska E-klubo ekhavis tre interesan materialon el historio de rusia kaj sovetia E-movado, kontaktinte kun veterano Aleksejev S.A. (Talĵino, Kemerova provinco).

ĉ) sendado de adresoj de sovetiaj geesperantistoj eksterlanden. S.Neilande tion ĉi faradis kaj organizadis.

12) Ellabori regularon por fakoj kaj servoj. Mi ĝin ne verkis, sed ellaboris projekton de ĝia plano. La regularo estas tre firme ligita kun la kriteriaro por socialisma konkurado inter la fakoj kaj servoj de SEJM. Se la lasta estos ellaborita, la regularon mi preparos dum semajno.

Nun mi volus analizi laboron de la fakestroj kaj iliaj fakoj dum la agadjaro. (Plue la raporto de V.Sapoĵnikov intermitas kun buŝaj kaj skribaj raportoj de la fakestroj kaj la konferencaj debatoj. - La red.)

B i b l i o g r a f i a   s e r v o

V.Cvetkova: Ĉi-jare mi fakte ne laboris pro malsano.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Cvetkova neis eventualan helpon de kunlaborantoj - tio estis ŝia eraro. Kaj tiu ĉi manko montriĝis sin jam ĉi-jare: kiam Valeria ekmalsanis, la laboro ekstagnis. Ŝi laboru ne nur kun la paperoj, sed ankaŭ kun SEJM-anoj. Mi opinias, ke sekvajare la servo nepre devas eldoni bibliografian informbultenon.

V.Cvetkova: Mi okupiĝas pri du laboroj samtempe: tutsovetia E-katalogo kaj katalogo de moskvaj kaj leningradaj bibliotekoj.

V.Sibircev: Eble indas peti de biblioteko, ke ĝi sendu al ni sian sliparon.

H i s t o r i a   f a k o

A.Ĥarkovskij (skriba raporto): En Odeso s-anoj Rubljov kaj Aŭderskaja trovis gravajn dokumentojn pri E-movado en la urbo en la XIX-a jarcento. Mi mem trovis aŭtobiografion de V.Jeroŝenko kaj liajn ankoraŭ ne publikigitajn leterojn. Aperis libro de V.Jeroŝenko "Elektito", kie enestas ankaŭ mia traduko. Estas verkita artikolo pri la militagento N.Kuznecov por "der esperantist". Estas prilaborita E-taglibro de malnova komunisto Kokuŝkin. Grupo de moskvaj E-istoj vizitis malnovan bolŝevikon N.N.Matvejev-Bodrij, kiu rakontis pri sia amiko, E-isto Sibircev, heroe pereinta dum la civila milito. Belogolovskij sendis al mi materialon pri konstruo de traktoro en 30-aj jaroj.

Konkludo: sistema historia laboro forestis. Malgraŭ reeĥoj, la plano, aperigita en "A", restis tamen "voĉo de krianto en dezerto".

La laboro ne estis centralizita. Ekzemple, sliparo de la mortinta fakestro Petrulis min ne atingis. La rakonto de Aleksejev pri Jeroŝenko restis en oreloj de la krasnojarskanoj. Neniu venis intervjui s-anojn Podkaminer kaj Demidjuk.

Opiniante, ke historia laboro preskaŭ fiaskis - eĉ historio de SEJM ne estas verkata - kaj pro multaj aliaj E-ŝarĝoj mi petas liberigi min de la posteno.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Pri la rakonto de Aleksejev: la memoraĵo estas surbendigita magnetofone kaj reskribita surpaperen. Ni simple ne trovis tempon por retajpi kaj sendi ĉion al Ĥarkovskij.

Ĥarkovskij persone povas tre bone okupiĝi pri historia laboro, sed gvidi - mi dubas, konkludante el liaj eldiroj en "A".

K a n t a f a k o - raporto forestas.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Mi nenion povas diri pri laboro de la fako, ĉar Vizgirdas min ne informis pri ĝia agado. La fakestroj devas esti pli disciplinemaj.

P.Jegorovas: Vizgirdas promesas eldoni la kantaron ĝis Novjaro.

K o l e k t a n t a f a k o

V.Baniulaitis (skriba raporto):

I.Membraro. Ĝis la 1-a de julio 1977 al KF aliĝis 64 esperantistoj el 23 urboj.

II.Skizo de la agado. Dum la agadjaro KF ricevis kaj respondis 112 diversajn demandleterojn kaj poŝtkartojn. Pro manko de necesaj E-aĵoj la fako povis priservi nur 39 personojn (E-libroj, insignoj, glumarkoj, stampiloj k.a.). KF ekrilatis kun jenaj similaj eksterlandaj E-organizaĵoj: 1) Klubo de kolektantoj de E-insignoj ĉe ĈEA; 2) Klubo de esperantistoj-kolektantoj ĉe BEA; 3) Esperanto-ligo filatelista (EIF); 4) Amika rondo de E-kolektantoj; 5) Filatelista E-klubo en Budapeŝto. Helpe de KF pluraj fakanoj aliĝis al eksterlandaj kluboj, nome: 14 - en KKEI ĉe ĈEA kaj 14 - en KFK ĉe BEA. Krome KF akiris iom da E-aĵoj, necesaj al fakanoj. Pli fruktodonan agadon de KF malhelpis neaktiveco de la anaro kaj ignoro flanke de SEJM-Komitato.

III.Financa stato de KF. La komitatanoj de SEJM, krom postuloj raporti pri agado kaj financa stato, neniel helpis la fakon finance. Je la 1.7.77. la enspezoj konsistigis 111.00 rub., la elspezoj - 31.90 rub. La saldo - 79.10 rub. fakte forestas, ĉar kontraŭ tiu mono estas akiritaj E-aĵoj. Post ilia disvendo dum BET kaj SEJT tiun sumon mi revenigos al SEJM-kaso. Plejparton da E-aĵoj por priservo de la fakanoj mi aĉetis per propra mono. Manko de financa subteno flanke de SEJM-Komitato senrajtigis min daŭrigi la eksterlandajn kontaktojn, dank' al kiuj mi sukcesis ricevadi la necesan E-literaturon. Mi multfoje turnis min al Komitato kun peto pri subvencio, sed vane. Vere, la 8-an de junio mi ricevis leteron de P.Jegorovas, kiu informis min, ke la kunsido de SEJM-Komitato decidis subvencii la fakon per 200 rub. kaj B.Anoĥin, ĉe kiu estas granda parto da SEJM-mono, estas komisiita urĝe sendi tiun sumon al mi. Pasis tamen pli ol monato, sed tiu "urĝa" sendaĵo ĝis nun ne atingis min. Evidente iu en Komitato (plejŝajne k-do Cibulevskij) intence malhelpas normalan KF-laboron. Jen kia fakta stato - la SEJM-mono kuŝas senutile, anstataŭ esti eluzata por bezonoj de SEJM-anoj. Jen obstakloj, kiujn la fako bedaŭrinde ne povis supervenki, kaj tial la sekva ĉapitro estas tiel mallonga kaj neimpona.

IV.Planoj por sekvanta agado.

Jam estas preparita projekto de insigno "SEJM-kolektanto", kiu aperos ĝis fino de oktobro kaj kiun ricevos ĉiu aliĝinto. Krome oni jam kompilas materialon de unufoja bulteno "SEJM-kolektanto" (proksimume 24-paĝa), kiu enhavos diversajn interesajn artikolojn, utilajn sciindaĵojn, konsilojn, informojn kaj anoncojn. Ĝi aperos fine de la jaro kaj ankaŭ estos dissendita al la fakanoj. Se la novelek-

tuta SEJM-Komitato subvencios la fakon, mi povos denove akiri la necesajn por ni E-librojn kaj priservi la fakanojn.

V. Konkludo. Malgraŭ indiferenteco de la SEJM-Komitato, la fako agis.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Mi volus diri, ke k-do Baniulaitis tro akre kaj subjektivisme juĝas la Komitaton kaj komitatanojn. Se li pri siaj aferoj kaj problemoj ĝustatempe informus min, eble ĉio estus en ordo. Tamen mi subtenas lin pri lia pretendo al la SEJM-Komitato: Cibulevskij devus doni al li la necesan sumon ĝustatempe. Ni ne devus uzi por tio la monon, kiu estas ĉe Anoĥin, ĉar tio estis pli malfacile kontrolebla. D.Cibulevskij povus doni la monon eĉ sen konsultado kun komitatanoj, ĉar Baniulaitis redonos ĝin plene, eble eĉ kun profito. Ni devas esti pli atentemaj al bezonoj de la fakoj. Pri laboro de k-do Baniulaitis mi estas kontenta, liaj organizemo kaj aktiveco estas imitindaj. Mi proponas restigi lin sur la posteno; mem li evidente ne kontraŭas tion.

M.Bronŝtejn: Nia klubo entreprenas prepari katalogon de nialandaj E-insignoj. Estas petata helpo de ĉiuj kluboj.

K o r e s p o n d a   s e r v o

S.Neilande (skriba raporto): Dum la tuta agadjaro estas forsenditaj entute 644 adresoj el 28 landoj al 29 sovetaj esperantistoj, kiuj petis adresojn por korespondado. Al 8 landoj estas forsenditaj 79 adresoj de sovetaj esperantistoj. En la revuo "Paco" mi aperigis 7 adresojn de sovetaj E-istoj, en "Juna amiko" - 2 adresojn. En "der esperantist" aperis mia korespondadreso kun peto skribi al sovetaj gestudentoj. En "Kurte" kaj "Aktuale" aperis prikorespondaj materialoj. Mi eldonis 2 cirkulerajn leterojn kaj dissendis ilin. Kontaktiĝi kun la klubaj respondeculoj pri eksterlanda korespondado mi ne sukcesis, ĉar neniu respondis al mi. Plej aktivaj kluboj pri korespondado estis Rostov-Don, Tula, Kievo, Tiĥvin, Ĥarkov, Barnaul Ĉeljabinsk k.a.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Miaj konkludoj pri laboro de KS: 1) necesas daŭrigi organizadon kaj kontaktiĝadon de la korespondaj servoj en SEJM-kluboj; 2) estas dezirinde kompiladi ĉiujare SEJM-adresaron de sovetiaj korespondemuloj kaj dissendi ĝin al eksterlandaj korespondaj servoj kaj E-kluboj, ankaŭ al individuoj; 3) indas subteni kompiladon de "Adresaro de sovetiaj geesperantistoj", kiun faras esperantistoj en Gorkij. Sufiĉe stranga estas tio, ke en la Taksa Demandaro ĝenerale ne estas iel poentigata la eksterlanda korespondado. Ĉu ĝi jam ne estas E-aktiveco? Aŭ ĝi jam ne havas sian edukan, propagandan, lingvoperfektigan signifon?

Mi volonte subtenas reelekton de Neilande al la fakestreco, notante ŝian disciplinemon, akuratecon kaj laboremon.

G.Gercikov: Korespondado estas unu el gravaj flankoj de kluba agado, kaj necesas restarigi ĝin en la TD. Adresaro de korespondemuloj devas esti kompilita.

## La dua tago - 14.8.77.

L e r n e j a   f a k o   - raporto forestas.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): La fako fakte estas ekster SEJM. Dum la lasta agadjaro tio tre evidentiĝis: nenio aperis en "A" (la raporto estis evidente verkita antaŭ apero de N-ro 11(44). - La red.), mem N. Starodubcev neniel sin montris al mi, kvankam mi al li skribis. Nek la raporton, nek laborplanon mi povis ricevi. La samon mi povus diri pri Sovetia ILEI-sekcio. La daŭran ekziston de la fako kaj la estrecon de Starodubcev mi subtenos sen entuziasmo. Laŭ iuj donitaĵoj, la fako tamen ion faras...

G.Gercikov: Mi proponas likvidi la fakon.

V.Sibircev: La fako havas ion komunan kun la metodika.

M a g n e t o f o n a f a k o - raporto forestas.
V.Sapoĵnikov (daŭrigo): S.Sadauskis verŝajne laciĝis, ĉar dum la tuta jaro li ne donis voĉon. Do mi proponas lin liberigi de la posteno. Aŭ trovu ni bonan aktivulon, aŭ likvidu la fakon, aliginte ĝin al iu alia, ekzemple, historia fako.
V.Kulikov: La fako estas necesa, sed la fakestron ni ŝanĝu.
R.Keliuotis: Sadauskis vere ne laboras. Sed la fako restu.
M e t o d i k a f a k o - raporto dume mankas.
V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Smetanina ne raportis kaj ĝenerale ne korespondis kun mi. Oni diras, ke ŝi laboris. Se ŝi estos pli disciplinema, mi ne kontraŭos ŝian reelekton.
N a t u r a m i k a f a k o
A.Kilk: La fako funkcias, sed modeste. La kaŭzoj: 1) mankas fakuloj, kiuj surprenus gvidajn taskojn por daŭra tempo; 2)mankas la fakaj terminaroj: dume ni disponas nur pribirdan nomaron kaj provizoran terminaron pri superaj plantoj kreskantaj en Estonio; 3) la E-naturamikoj tro indiferentas rilate al la naturo: eĉ naĝilingve ili ne perfektigas sin en scioj pri la naturo; 4) mia sanŝtato malhelpis.

La sekcio pri naturprotekto ĉe Tallinna E-klubo jam la 8-an jaron laŭvice estis ĉeforganizanto de la renkontiĝo-seminario "Esperanto kaj Naturo" (EkN). EkN estas forumo de naturamikoj, kie oni pritraktas la problemojn pri la naturo kaj interligoj de homo kaj naturo. La agadon de EkN preskribas ĝenerala kunveno fine de ĉiu seminario, dum kiu oni taksas la faritan laboron kaj elektas organizan komitaton por la sekva seminario. Programo de la seminario diferencas de ordinaraj E-renkontiĝoj pro la akcento: lerni, observi, diskuti, studi!

En EkN VIII (2. - 10. 7. 77.) ni faris birdobservan studvojon, laŭ kiu nin gvidis en frumatenoj d-ro A.Pruler. Ni surpaperigis la nomojn de viditaj aŭ aŭditaj birdoj, observis ilian konduton binokle, studis iliajn nestojn kaj idnutradon; krome ni aŭskultis birdkantojn per magnetofono, rigardis birdojn per diapozitivoj. Ni faris studvojetojn al kreskaĵoj, studante iliajn nomojn sub gvido de s-ano A.Heintalu kaj s-anino A.Laur. En la programo estis du fakaj prelegoj (d-ro A.Pruler, doc. L.Leivategija) kaj du fakaj informoj. Okazis du unutagaj ekskursoj. Unu tagon ni laboris, purigante la arbaran parkon, kie estis la tendarejo, de superfluaĵoj. Laŭ la praktika laboro farita dum EkN-oj ni gajnis estimon de koncernaj oficejoj. La distrikta kinoreto demonstris al ni laŭ nia mendo 6 mallongajn prinaturajn filmojn. Ni konversaciis pri E. kun studentoj - labortaĉmentanoj, ili reciprokis per koncerto, pri kiu informis Estona Radio. Okazis paroliga kurso sub sindona gvido de s-ano J.Ojalo. Entute la seminarion partoprenis 39 personoj. Krom Estonio, la partoprenintoj estis el Riga, Palanga, Vilnius kaj Ĥarkov.

La ĝenerala kunveno de EkN VIII taksis la seminarion kontentiga, kun rimarko, ke ĝi estis kvante modesta, sed enhave afereca. Estas elektita organiza komitato por EkN IX el 11 personoj sub gvido de A.Kilk. La kunveno rekomendis: 1) eviti partoprenigon de personoj, kiuj ne interesiĝas serioze pri la naturo, ne perfektiĝas en scioj pri la naturo; 2) regule aperigi aktualaĵojn pri la naturo kaj ĝia protekto en "Amikeco".

Ĉe la fondo de EkN estis intenco organizi ĝin laŭvice en diversaj respublikoj. Ĝis nun ni sukcesis nur unu fojon organizi ĝin ekster Estonio - pasintjare en Latvio. Estus tre dezirinde se iu alia respubliko proponus sin por organizi postvenontjarajn EkN-ojn. La elektita komitato intencas organizi EkN IX en Estonio kune kun BET-19. Tial la komuna programo estos naturprotekta kaj pedagogia.

Dank' al la okjara organiza laboro de EkN, E-naturamikoj iĝis

konataj ĉe naturprotektaj oficejoj de Estonio. La oficialuloj rilatas al ni estime, eĉ helpeme. Se estus pli da fakulej-esperantistoj, tiam oficialigo de Esperanto en tiu kampo estus baldaŭa realo. Tamen jam nun procento de naturamikoj inter E-istej multe superas tiun inter ĝenerala publiko.

Se mia sano permesos, mi helpos organizi ankaŭ la postvenontjaran EkN X, kiu kiel jubilea daŭros du semajnojn. Post tio mi tre deziras liberiĝi de la respondecaj organizaj laboroj.

Fine mia dezirego estas, ke ĉe ĉiu E-klubo ekaktivu naturamika grupo.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): La fako fakte estas ekster SEJM. Miaj leteroj estis respondataj nesufiĉe kaj neplene. Tamen, ĉar adeptoj estas - ni reelektu k-don Kilk, kondiĉe ke li pli ofte informos en "Aktuale" pri la fako.

A.Kilk: Necesas aldoni, ke estas preparata fakvortaro. La eldono dependas de laboro farata de samfakuloj eksterlande.

G.Gercikov: La fako kontaktu kun s-ano Krajnov, kiu kompilas fakvortaron pri kreskaĵoj.

V.Sibircev: La fako estas certagrade scienca.

V.Kulikov: Necesas pli multe skribi al "A" kaj ĝenerale pli aktive informadi pri la fako.

P o e z i a   f a k o

L.Novikova: La fako organizis du belartajn konkursojn - "Liro-76" decembre en Miass kaj "Oriento-77" en kadroj de OrSEJT-19. Estis kolektataj materialoj por eventuala eldono de poezia kolekto. Mi proponas kunigi la fakon kun la kanta kaj traduka en unuecan belarten fakon.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): L.Novikova ne plenumis sian laborplanon plene pro la estiminda kaŭzo: organizaj klopodoj lige kun la preparado de OrSEJT-19. Tamen dum la jaro estis organizitaj konkursoj "Liro-76" kaj "Oriento-77", ŝi aperigis ankaŭ artikolojn en "A", akurate raportis pri la faka agado al mi. Ŝia disciplineco estas modela.

L.Novikova: Pri la konkursoj mi jam skribis en "A", ke ili estu duŝtupaj: komence regionaj ("Muzo", "Liro" ktp.) kaj poste la tutsovetia konkurso.

M.Bronŝtejn: Indus publikigi la premiitajn verkojn.

G.Gercikov: Utilus organizi seminarion pri poezio.

V.Kulikov: Por publikigi belartaĵojn uzeblas "Amikeco".

P r o p a g a n d a   f a k o - temos aparte.

S c i e n c - t e k n i k a   f a k o

A.Gonĉarov (skriba raporto): Estas fonditaj du sekcioj: elektroteknika kaj konstruista. Estas redaktitaj, tajpitaj kaj transsenditaj al "Scienca Revuo" 5 artikoloj kaj 2 - al "Sciencaj komunikajoj". Estas organizitaj 4 fakaj korespondligoj. La fako eldonis 5 numerojn de STF-bulteno. Estas iniciatita informilo de STF-oj en socialismaj landoj. La komencita surperfokarta tutmonda adresaro de sciencistoj-esperantistoj enhavas jam ĉ. 100 adresojn. Por la STF-biblioteko estas aĉetitaj 14 ekzempleroj da E-lingvaj libroj (jarkolektoj) de 9 titoloj.

Por la agadjaro 1977/78 la fako planas: fondi du novajn fakajn sekciojn; eldoni 3 E-lingvajn STF-bultenojn; komenci eldoni ruslingvan bultenon pri problemoj de Esperanto en la scienco kaj tekniko; sendi al "SR" kaj aliaj E-revuoj 7 sciencajnartikolojn; organizi somere de 1978 konferencon de sovetaj sciencistoj-esperantistoj; daŭrigi la komencitajn kartotekojn; organizi 5 fakajn korespondligojn; instrui koresponde Esperanton al 10 sciencistoj.

Mi petas doni al Barnaula E-klubo 60 poentojn por la laboro de STF-Komisiono kaj al Tiĥvina E-klubo 40 poentojn por la laboro de la Terminologia Centro.

Mi pretas daŭrigi la laboron sur la posteno de STF-gvidanto.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): La fako povas esti modelo por la aliaj fakoj laŭ la strukturo kaj gvida organizeco. Fakte A.Gonĉarov ne bezonis mian helpon kaj gvidadon. Tamen, malgraŭ ĉio bona, estas malbona tio, ke li ne sendis al mi la agadjaran raporton. Ja STF ankoraŭ apartenas al SEJM.

M.Bronŝtejn: La plej grava por la fako estas la terminara laboro, kiun gvidas V.Gakalenko kaj A.Kogan. Ili pretigas grandan bildvortaron. Por pluraj temoj mankas kunlaborantoj. Estas granda stoko da terminaroj, kiujn la kluboj povas ricevi mikrobende - tio estas SEJM-havaĵo.

S o c i o l o g i a   f a k o - raporto forestas.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Ŝilas fakte nenion faris. Mi opinias, ke la fako ne estas bezonata kiel memstara. Ni enigu ĝin en la interlingvistikan fakon, kiel ties sekcion, ĉar la sociologiaj esploroj estas firme ligitaj kun la taskoj de la Problema grupo. Ni ne dispolvigu la fortojn kaj tempon de niaj E-esplorantoj!

V.Kulikov: La laboro estas bezonata, kaj prefere en aparta fako.

A.Melnikov: La fako havas preskaŭ nenion komunan kun la interlingvistika. Do ni aŭ trovu alian gvidanton, aŭ likvidu la fakon ĝenerale.

T r a d u k a   f a k o

V.Ebel (skriba raporto): La fako organizis konkurson pri traduko de la rakonto de Baĵov "Solneĉnij kamenj". En la konkurso partoprenis 3 personoj. (La rezultoj aperos aparte. - La red.) La konkurso pri tiu rakonto estas daŭrigata ankaŭ por la sekva jaro. Krome, paralele al ĝi estos proponita pli facila teksto, kaj oni povos elekti. Mi preferas resti sur la sama posteno por la sekva jaro. Ĉijare mi petas ne poentigi la laboron de la Traduka fako.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): V.Ebel laboris same kiel la antaŭuloj, eĉ malpli aktive. Do, laboro estas nekontentiga. Necesas tute nove organizi laboron de la fako - amase, plane. Laŭ la malnova maniero ni ne atingos multon.

V.Aroloviĉ: La teksto proponita de Ebel estis tro komplika, tial reehis nur 3 personoj. En OrSEJT-19 li gvidis tradukistan kurson kaj kompilis liston de dezirantoj studi tradukadon koresponde. La volontuloj estos dividitaj en grupojn po 3 personoj, kiuj kontrolados sin reciproke.

V.Sibircev: Indus kompili liston de tradukindaj verkoj.

I n t e r l i n g v i s t i k a   f a k o - raporto forestas.

V.Sapoĵnikov (daŭrigo): Dank' al sperto kaj meminteresiĝo de B.G.Kolker, la fako de la unuaj paŝoj tenas ĝustan direkton. Necesas nur pli aktive arigi la kunlaborantojn ĉirkaŭ tiu ĉi bona afero.

A.Melnikov: La fako havas du direktojn: kunlaboro kun interlingvistikaj rondoj ekster SEJM kaj interlingvistika klerigo interne de la movado.

S.Kuznecov: Dum OkSEJT-19 okazis faka kunveno, kiu decidis organizi laborgrupojn pri esperantologio kaj pri interlingvistiko ĝenerale. Ni planas eldoni kelkajn artikolkolektojn.

V.Sapoĵnikov (konkluda parto de la raporto): Miaj konkludoj pri la fakoj kaj servoj, kaj ĝenerale pri la faka sistemo de SEJM estas jenaj:

1. Necesas pli objektive elektadi la fakestrojn, ĉiuflanke pridiskutante la kandidatojn. Ĉar ofte malbonas inter ili la disciplineco, organizeco.

2. La fakestroj devas esti ĉiam SEJM-anoj kaj agi unuavice por SEJM, sed ne ekster SEJM.

3. La fakestroj memoru pri ekzisto de la vicprezidanto kaj pri siaj devoj (informado, raportado, varbado, organiza laboro ktp.).

4. Ĉiu fakestro eduku la anstataŭontojn, la aktivularon, pli aktive varbu la kunlaborantojn. La fakoj de SEJM devas esti amasaj. Ni devas alpreni la sloganon: "Ĉiu SEJM-ano iĝu fakano!".

5. Necesas verki la Regularon por fakoj kaj servoj de SEJM, kies unu el la ĉapitroj estu "Socialisma konkurado inter la fakoj (servoj) de SEJM".

6. Ĉu estas bezonate nomi "fakoj" kaj "servoj"? Pli bone estos, se ni havos nur fakojn de SEJM, al kiuj strukture povus aparteni sekcioj kaj servoj.

7. Laŭ la propono de L.Novikova, kiun mi entuziasme subtenas, ni reorganizu la poezian, kantan kaj tradukan fakojn en belartan fakon de SEJM, kun la sekcioj: kanta, poezia, traduka. En la strukturon de la fako ni enigu la magnetofonan servon (por priservi ĉiujn sekciojn). Se magnetofona priservado estos bezonata por la ceteraj fakoj, ni simple aĉetu por ili la magnetofonojn - tiel estos pli oportune por ĉiuj. Tian bezonon povus havi la fakoj metodika, historia, eble ankaŭ interlingvistika. Ni devas pli malavare provizi niajn fakojn per la necesaj helpiloj.

8. Ankoraŭ pri la historia fako. Ĉar ĝiaj taskoj kunfluas kun tiuj de la Problema grupo, do estu ĝi ankaŭ (same kiel la sociologia) sekcio de la interlingvistika fako.

9. Kaj ankoraŭ pri la lerneja kaj naturamika fakoj: ili ekzistas kaj ne ekzistas. Iu laboro estas, sed preskaŭ plene ekster SEJM Do, necesas pripensi la situacion.

10. Estas propono de k-do Lineckij M.J. organizi la fakon de esperantistoj-aŭtistoj. Ili povas helpi al eksterlandanoj dum kontaktoj kun riparaj organizaĵoj kaj fari alian laboron. Laŭ lia informo - jam aliĝis 5 kunlaborantoj. Do mi subtenas la proponon kaj atendas aperon de la nova fako - la aŭtista. K-do Lineckij konsentas esti la fakestro.

Por la agadjaro 1977/78 mi proponas jenan strukturan organizon de la faka sistemo de SEJM:

1. Bibliografia fako.
2. Kolektanta fako.
3. Koresponda fako.
4. Metodika fako.
5. Propaganda fako (sekcioj: de gazetara informado, de televida kaj radia propagando, de prelega propagando, de montra agitado, de kampanjo-organizo, informa servo, redakcio de "Propaganda kolekto de SEJM").
6. Scienc-teknika fako, Naturamika fako, Lerneja fako - se ili restos en SEJM.
7. Interlingvistika fako (sekcioj: sociologia, historia).
8. Belarta fako (sekcioj: kanta, poezia, traduka, magnetofona servo).
9. Aŭtista fako.

Tiel mi imagas la estonton de SEJM-fakoj. Mi ne kontraŭas resti sur la posteno.

V.Kulikov: Tute ne necesas kunigi la historian kaj sociologian fakon kun la interlingvistika.

M.Lineckij: La ideo unuigi E-aŭtistojn aperis pro elsendo de Viena Radio. Mi ricevis adreson de Internacia Aŭtista E-klubo kaj iĝis ties reprezentanto en USSR. La proponata fako povus informadi pri tiu klubo, labori pri terminaroj. Estas ricevita la terminaro de FIAT.

Oni rekomendas al la aŭtistoj eniri la Scienc-teknikan fakon.

V.Sibircev: Pri la historia fako: ĝi devas havi du direktojn - histori-esplora kaj kolektado de dokumentoj pri SEJM-agado. Do la fako havu du sekciojn. La fakoj malbone kontaktas inter si. Ĉiuj fakestroj kaj ĝenerale SEJM-funkciuloj devas havi paperujon trans-

donendan al la posteulo. Post la tendaroj devas esti eldonataj kantaretoj. Necesas organizi en SEJM fotoservon.

L.Novikova: Ĝi povas eniri belartan fakon.

G.Gercikov: Ni havas kaj lernejan kaj metodikan fakon, kies laboro ne estas videbla. Necesas speciala fako, kiu respondecus pri korespondа instruado de la lingvo.

V.Bespalov: Devas esti lerneja fako, ĉar ĝi reprezentas ILEI.

V.Sibircev: Eblas unuigi la lernejan fakon kun la metodika kaj komisii al la komuna fako okupiĝi pri korespondaj kursoj. Necesas, ke estu korespondkursoj en Moskvo.

V.Aroloviĉ: Dume ne troviĝis taŭga persono por tio.

M.Bronŝtejn: Pasintjare estis propono pri reorganizo de la faka sistemo. Estu nur kelkaj direktaj fakoj, kiuj havu sekciojn.

V.Aroloviĉ: Laŭ tia strukturo ne estos pli facile trovi gvidantojn por ĉiu sekcio.

G.Gercikov: Bibliografia servo estas malforta, eble ni unuigu ĝin kun iu alia.

V.Cvetkova: Nia laboro ne estas farata plene. Sed kunlabori povas nur profesiuloj. La kluboj devas surloke organizi bibliografian priskribon de E-artikoloj. Krome utilus fari katalogojn de propraj bibliotekoj.

V.Sibircev: Se mankas bibliotekistoj, necesas ilin eduki inter ni kaj E-igi profesiulojn.

Temo: Informa laboro en SEJM.

A.Medinŝ: Pri la fako aperis kvar artikoloj en "Aktuale". Estis organizitaj du konkursoj pri universala SEJM-propagandafiŝo kaj unu pri SEJM-leterpapero. Anoncoj aperis en "Kurte" kaj "Aktuale".

La fakestro prelegis pri la fako dum jenaj E-renkontiĝoj: Riga - Tallinn (oktobro 1976), "Ora Folio" (novembro 1976), "Neĝfloketo" (marto 1977), Ignalina boatado (majo 1977), "Esperanto kaj Naturo", OrSEJT-19. Lige kun fondo de klubaj informaj fakoj mi vizitis la klubojn de Vilnius, Klaipeda, Tallinn, Leningrado, Tiĥvin.

Ĉefa mia tasko estis kompili manuskripton de "Manlibro de Aktivulo". 60% estas pretaj, bedaŭrinde ne ĉiuj sendis la promesitajn artikolojn.

Estas starigita kontakto kun Informa Fako de UEA.

Skribe al alvokoj en "Aktuale" respondis nur Rostov-Don. Dume mankas reeĥoj el orientaj SEJM-kluboj. Estas dissenditaj du "Informaj Kolektoj de SEJM".

V.Sapoĵnikov (el la skriba raporto): La estro estas aktiva, estas faitaj multaj aferoj, precipe la organizita informado per "Aktuale". Tamen mi konsideras la laboron de tiom grava fako nesufiĉa, ĉar multo farenda ne estis organizita. Plej gravas, ke la fakestro ne organizis eldonadon de ĉiumonata informilo "Propaganda kolekto de SEJM" (kun aparta redaktoro, ruslingva). Ankaŭ estus bezonate strukturigi la fakon, kaj krom la redaktoro de la kolekto, trovi el SEJM-aktivularo estrojn de jenaj sekcioj de la fako: 1) de la montra agitado; 2) de la gazetara kaj TV-radia informado; 3) de la prelega propagando; 4) de kampanjoj por oficialaj instancoj; 5) de porpaca movado (MEM). Tiuj respondeculoj povus bone organizi la propagandajn aferojn. Ili povus organizi ankaŭ la inform-propagandan centron de SEJM, kies taskoj estus: organizi la propagandan laboron en tutsovetia skalo laŭ supremenciitaj direktoj, kolekti kaj distribui E-informojn en kaj el E-medio, eldoni la "Inform-propagandan kolekton de SEJM" ĉiumonate (ruslingve), koordini laboron de la klubaj propagandaj fakoj, ktp.

A.Melnikov: Informa laboro estas la plej ĉefa direkto de SEJM-agado.

M.Lineckij: Mi ricevis afiŝon, kie estas skribita ke E. estas "artefarita" lingvo. Tiel oni ne devas informadi.

A.Medinŝ: Estas preparataj prelegoj por diversaj grupoj de aŭskultantoj. Laŭ la anoncita konkurso pri afiŝo estas elektita la plej bona, kaj baldaŭ la universala afiŝo estos preta. Pri ruslingva informilo promesis helpi Rogov. La kluboj pli aktive kontribuu al "Sovetskaja molodjoĵ", kie ĵus reaperis la E-rubriko.

Temo: Internacia laboro de SEJM.

A.Melnikov: SEJM ne povas iun vojaĝigi eksterlanden, sed povas sugesti eblajn vojojn kaj manierojn por tio. Ekzemple, oni povas organizi studentan interŝanĝon. Sed por tio devas ekzisti iu studenta kolektivo. Post la kreiĝo la grupo devas iniciati kolektivan korespondadon. Ĝin devas sekvi laborplano, kiu povas antaŭvidi partoprenon foreste en sciencaj E-konferencoj, en konkursoj de studentaj referaĵoj. Oni povas interŝanĝi studentajn labortaĉmentojn, instrui en someraj E-kursoj eksterlande, partopreni grupe artajn aranĝojn. Eblas organizi invitojn por diversaj solenaĵoj pere de komsomolaj organizaĵoj. Oni kontribuu al la agado de interlingvistikaj esplorgrupoj eksterlande. Do, eblecoj estas - necesas provi.

M.Bronŝtejn: Ĉiujn studentajn vojaĝojn konfirmas CK de Komsomolo. Do indas kontakti kun ĝi anticipe.

S.Gamzin: En Komia ASSR laboras multaj bulgaroj. Niaj studentoj patronas la entreprenon, kie ili laboras.

A.Melnikov: Kie estas studentaj E-grupoj, anonciĝu al mi.

Estas registratai la grupoj en Omsk, Krasnojarsk, Barnaul, Tula k.a.

A.Melnikov: Estas eble partopreni Pupteatran Internacian Festivalon. La organizantoj de PIF pretas oficiale inviti niajn pupteatrojn. Do oni provu kontakti kun lokaj pupteatroj, traduki ion el la repertuaro kaj vojaĝigi al PIF.

A.Urdajev: Ni jam ekkontaktis. La reĝisoro ne kontraŭas, sed ĉijare ni malfruis.

O.Ŝtraler: Multaj E-kluboj laboras en kadroj de KID. Dum interŝanĝo de sperto inter KIDoj oni pli aktive informadu pri E-agado.

A.Melnikov: Necesas pli aktive kontakti kun lokaj packomitatoj. Ekz., ni en Rostov kontaktas regule, sendas niajn planojn kaj raportojn.

V.Sibircev: Ni kontaktis kun sekretario de packomitato. Por ili la plej grava afero estas kolekti monon por la Pacfonduso. De ni decidis ĉiujare direkti certan monsumon al Pacfonduso, por ke la packomitato estu interesita pri ni.

V.Cvetkova: Leningradanoj havas tre bonajn kontaktojn kun packomitato. Speciala grupo tradukas ĝiajn materialojn. Dank' al k-do Podkaminer oni ĉiam helpas renkonti eksterlandanojn ktp.

M.Lineckij: Kiam ni provis kontakti, la packomitato rifuzis, ĉar nia klubo ne estas oficiala.

A.Melnikov: En Tjumenj la packomitato pripagis al E-istoj E-prelegojn.

B.Granat: Ministerio de supera klerigo sendis leteron al Kulakov, ke E. povas kaj devas esti instruata fakultative.

A.Melnikov: Ni devas plibonigi kontaktojn kun la societo "Scio". Dank' al ĝi oni povas ankaŭ organizi eksterlandajn vojaĝojn.

M.Bronŝtejn: Ni havas prelegojn recenzitajn de "Scio".

T.Bercis: Ankaŭ al ni "Scio" promesis konfirmi prelegojn, post tio ni rajtos prelegi eĉ en Scienca Akademio.

A.Urdajev: Ankaŭ ni havas bonajn kontaktojn. 10 niaj klubanoj havas membrokartojn de "Scio".

V.Noĉovkin: Nin "Scio" oficvojaĝigas.

V.Sibircev: Mi estas delonga ano de "Scio" kaj multe prelegas.

A.Kilk: Oni kunprenu prelegojn al Konferenco por kompari.

A.Melnikov: Mi atentigas pri societoj de amikeco. Dume ni uzas tiun kanalon nesufiĉe.

V.Bespalov: Nia klubo estas kolektiva membro de la urba societo de amikeco. Ni ofte vizitas ĝin, kaj se estas invitoj el eksterlando, la societo volonte helpas.

A.Melnikov: Do eblecoj estas. Necesas provi aliĝi al iu societo de amikeco kun certa lando. Gravas uzi ligojn kun ĝemelurboj.

V.Kulikov: Nia urbo ĝemelas kun Peŝto (Hungario). Dume E-kontaktojn ni ne sukcesis starigi.

A.Vološina: Eble E-istoj sukcesos partopreni trajnon de amikeco inter Lvov kaj Peĉ.

A.Melnikov: Oni provu organizi sendevizajn interŝanĝojn pere de "Sputnik". Estis tia provo en Doneck, sed mankis dezirantoj.

V.Noĉovkin: Ni starigis rilatojn kun ĝemelurboj Koŝalino (Pollando) kaj Veliko Tirnovo (Bulgario). Estas subskribitaj kontraktoj pri kunlaboro.

A.Melnikov: Eksterlandaj veturoj devas esti preparataj anticipe. SEJM klopodis akiri invitojn al diversaj E-aranĝoj eksterlande: medicina seminario en Krakovo, por instruistoj al E-kursoj en Lanĉov (Ĉeĥoslovakio), labortaĉmento en Hungario. Sed ni ne sukcesis operative realigi la invitojn, kaj neniu sukcesis veturi. Estonte ni atentu jenajn aranĝojn: pacseminario en Poznan, lingvosociologia seminario samloke, junulara E-festivalo en Pollando, E-instruista seminario en Lanĉov, E-laborbrigado en Hungario, Somera E-Universitato en Hungario, Internacia renkontiĝo de E-naturamikoj en Hungario, Internacia pionira tendaro en Hungario, seminario de Germana E-Junularo, TEJO-Kongreso en Bulgario. Detalojn pri ĉiuj ĉi aranĝoj estas ĉe mi. Do dezirantoj anonciĝu.

En "der esperantist" kaj "Aktuale" estis alvoko helpi al GDR-anoj por organizi ekspozicion pri USSR. En Poznan estos ekspozicio de politikaj afiŝoj. Necesas pli aktive interŝanĝi planlingvistikajn materialojn. Grave atentinda estas Semajno de Internacia Amikeco.

## La tria tago - 15.8.77.

A.Melnikov: En 1978 okazos la junulara Festivalo en Kubo. Venis kelkaj proponoj el Ivanovo lige kun eventuala E-renkontiĝo tie. Dume mankas respondo de kubaj E-istoj. Eblas kompili albumon pri SEJM por la Festivalo.

V.Aroloviĉ: Eblas skribe informiĝi ĉe KMO, ĉu okazos aŭ ne la E-renkontiĝo dum la Festivalo. Se ne, la albumon sendi ne valoras.

L.Kovalenko: Nia klubo povus fari la albumon kondiĉe ke aliaj kluboj kunlaboros.

Oni decidas kolekti materialojn por la albumo kaj sendi ilin al Omska E-klubo.

V.Samodaj: Indus fari la albumon en kelkaj ekzempleroj por sendi al la socialismaj landoj kaj al TEJO. Ni povus eldoni ion prijunularan en E., por tio necesas organizi petojn el eksterlando. Oni skribu al SSOD kaj "Moskvaj novaĵoj".

A.Melnikov: Lige kun Moskva Olimpiko necesas, ke sportuloj el eksterlando skribu al la organizantoj, petante eldoni la E-frazlibron. La E-istoj montru sian intereson pri la ludoj.

D.Mametova: Iu devas koordini la kampanjon. Nia klubo pretas respondeci pri tio.

Oni decidas komisii al Tjumena klubo la koordinajn taskojn.

V.Samodaj: La rusa teksto por la frazlibro jam estas preta. Do restis nur solvi la problemon pri eldono.

A.Melnikov: Mi rememorigas pri SEJM-delegitoj. La delegitoj de-

vas helpi al eksterlandaj E-istoj trovi kontaktojn kun lokaj junularaj kluboj. En socialismaj landoj baldaŭ oni eldonos kelkajn E-librojn kaj provos interkonsenti, ke ili aperu en niaj vendejoj, do oni nepre mendu. El SSOD la kluboj povas peti E-librojn senditajn el eksterlando kaj abonojn. En kelkaj landoj estas produktitaj E-filmojn, oni provu ilin ricevi pere de societoj de amikeco.

Kunlaboro kun TEJO kaj UEA ne estis brila. En pluraj urboj estas eksterlandaj studentoj, necesas partoprenigi ilin en la E-vivo. Resume: SEJM ne oficvojaĝigas, sed helpas kontakti. Ĉiu klubo devas prepari ion por siaj eksterlandaj korespondantoj lige kun la 60-jara jubileo de Oktobro. En Pollando estas fondita internacia literatura premio, indas partopreni la konkurson.

V.Sibircev: Ĉiu eksterlanda kontakto estas soci-utila laboro. Helpon de instancoj ni petu, nur jam farinte ion utilan.

V.Bespalov: En Soĉi estas citrusa arbo kun multaj greftoj de eminentuloj (Arbo de Amikeco). Inter aliaj estas 6 E-greftoj, la lasta estis ĉi-jare lige kun la 90-jara jubileo de E.

L.Kovalenko: Mi proponas planti pormemorajn arbaretojn post fino de E-kursoj.

A.Melnikov: Eblas fari tion en ĝeneralaj parkoj lige kun E-renkontiĝoj.

Temo: Analizo de la sperto pri organizo kaj efektivigo de OrSEJT-19 kaj OkSEJT-19.

O r S E J T - 1 9

L.Novikova: La partoprenintoj de OrSEJT kaj la Prepara Komitato pledas por daŭrigo de la dutendara sistemo. Unuecan tutsovetian tendaron ni ne povus organizi, ĉar ne sufiĉus lokoj. Dum la preparado ni spertis malfacilaĵojn, ĉar ne laboris v/p pri renkontiĝoj. Ni ne sukcesis operative ricevi necesan monsumon. Mi proponas, ke estonte Klubo-Mastro anticipe ricevu el SEJM-kaso ne malpli ol 500 rub. La partopreno estis pli multekosta, ol ni antaŭplanis, sed tio liberigis la organizantojn de pluraj teknikaj zorgoj kaj ili povis pli da atento dediĉi al la tendara programo. Tion ni konsideru por estontaj tendaroj.

V.Aroloviĉ: La organizintoj de la tendaro faris tre grandan kaj fruktodonan laboron, kaj malgraŭ diversaj malfacilaĵoj la tendaro pasis tre bone. En OrSEJT estis daŭrigita la praktiko de Paroliga Periodo, kiu daŭris 3 tagojn, la tendaro mem - 7 tagojn. Por PP estis formitaj 8 grupoj. Ĉiu grupo havis apartan vojplanon. Taskoj de la grupoj estis ne nur paroligo de komencantoj, sed ankaŭ prepariĝo al la tendaraj vesperaj aranĝoj. La listoj de la grupoj estis preparitaj anticipe kaj dissenditaj al la grupgvidantoj. Post reveno de la PP-grupoj okazis kunveno de SEJM-Konsilantaro, kiu pridiskutis la rezultojn de PP. Ĉefaj konkludoj de la kunveno estas: 3 tagoj ne sufiĉas, prefere estu 5-taga PP; nepre estu la unueca instruprogramo, kiun ĉi-jare ne sendis Metodika fako; oni evitu tro komplikajn vojplanojn, kiuj ne lasas sufiĉe da tempo por okupiĝi pri E. En la tendara programo funkciis instruado sur ĉiuj niveloj. Okazis E-Universitato - pro manko de prelegantoj nur por unu kurso, prelegis B.Kolker, T.Koptjagina, V.Aroloviĉ, A.Medinŝ k.a. pri la temoj neprre ligitaj kun E-movado aŭ lingvo. Tradukista kurso sub gvido de V. Ebel analizis rezultojn de la traduka konkurso. Por la plej malprogresintaj anoj de ĉiuj PP-grupoj estis organizitaj komunaj daŭrigaj parolgrupoj, kiujn gvidis E.Perevertajlo kaj Z.Skvorcova. Okazis pluraj kultur-distraj aranĝoj: belarta konkurso "Oriento-77", Neptuna festo, festo de naskiĝtaguloj, rida vespero, lumbilda vespero, KGS ktp. La PP-grupoj restis unuecaj dum la tendaro, kaj la tuta tendara vivo estis organizita laŭ PP-grupa, sed ne kluba strukturo.

Tio akcelas establon kaj firmigon de amikaj ligoj inter E-istoj de diversaj urboj.

G.Gercikov: Pro kio la tendaro estis tiom multekosta?

L.Novikova: Nia urbo estas malgranda, kaj ni ne sukcesus memstare aĉeti necesan kvanton da nutraĵoj. Do ni decidis elaĉeti turistajn ripozkartojn, por ke la turisma stacio provizu nin per ĉio bezonata. SEJM-Komitato permesis tion.

OkSEJT-19

V.Noĉovkin: En la Prepara Komitato tre multan laboron faris V. Grigorenko. Ni anticipe sciigis la klubojn pri la tendaraj kondiĉoj. Ni preparis insignojn, emblemojn, presis invitilojn kaj tendaran libron - tio postulis multan monon. PP ne estis organizita pro manko de sperto kaj timo fiaski.

A.Melnikov: En OkSEJT okazis kunveno de tendaranoj, kiu pridiskutis la rezultojn de la tendaro kaj konkludis pri ĝiaj mankoj. Plimulto da tendaranoj malkontentas pri la nutrado kaj pri loĝado en urba hotelo. Tre malhelpis la manko de PP. En la tendaro abundis "krokodiloj", tute indiferentaj al la tendara vivo. La organizintoj ne okupiĝis pri la programo, kaj multaj eroj estis nepripensitaj, okazis ekspromte dank' al kelkaj aktivaj tendaranoj. Mankis aranĝoj por la ekstera publiko. Fakte ne okazis la E-Universitato, estis nur somera prelegejo. Estas propono de k-do Tokarev multobligi la universitatajn lekciojn kaj la aŭskultantojn ekzameni kun posta enmanigo de atestoj.

G.Gercikov: La tendaro estis la plej malbona el ĉiuj partoprenitaj de mi. La tendaroj devas pasi en libernaturaj kondiĉoj kaj esti malmultekostaj. La 4-rubla kotizo estas troa. Devas esti 5-taga PP kaj 10-taga tendaro. Pro la hotelaj kondiĉoj oni malbone kunvenis. Ankaŭ la tro severa hotela regularo malhelpis normalan tendaran vivon.

L.Kovalenko: Gercikov troigas. La tendaranoj rajtis rezigni pri la manĝtalonoj kaj rericevi la monon. Pri krokodilado ni postulu pli da respondeco flanke de la klubestroj. En la naturaj kondiĉoj oni povas frosti, malsani. Do nepre devas esti iu domo, tamen plene okupita de E-istoj.

V.Kulikov: La mastroj faris grandan laboron. Do ni ilin danku kaj ne kulpigu pri tio, kio estas tasko de Tendara Estraro. La tendaroj en naturaj kondiĉoj estas preferindaj, sed apud la tendoj estu domo por fizike malfortaj tendaranoj. La tendaro havis mankojn, sed ne fiaskis.

V.Cvetkova: Tendaj kondiĉoj ne estas la plej bonaj, sed ankaŭ troan lukson ni ne bezonas. Estas imitinda la praktiko de BEToj: oni luas iun lernejon aŭ komunloĝejon, kie estas neniu krom E-istoj. La tendaranoj devas observi la tendaran disciplinon, ne malhelpu al aliaj. La sperto de Tiĥvina SEJT montras, ke memstare akiri ĉion necesan estas tre multzorga kaj malfacila tasko.

D.Cibulevskij: Pri la preparado okupiĝis nur Grigorenko kaj Noĉovkin. Mi proponis SEJM-monhelpon, ili rifuzis. Ĉiujn bonajn flankojn la tendaro ŝuldas ne al ili, sed al Tendara Estraro.

A.Kotelnikov: La tendaro ne fiaskis, sed simple trapasis.

A.Kuprienko: Pro multekosteco multaj studentoj ne povis aliĝi al la tendaro. Por ke al ĉiuj sufiĉu lokoj, estu nepre du tendaroj. Estu 4-taga PP, 8-taga tendaro kaj 3-4-taga Konferenco, kiun eblus komenci jam en la lastaj tagoj de SEJT.

M.Bronŝtejn: Pli ol io ajn gravas programo de la tendaro. Pri tiu de OkSEJT neniu respondecis. La mastroj preparis necesajn kondiĉojn, sed la programon devis prizorgi la v/p pri renkontiĝoj, kiu nenion faris. Estonte la Tendara Komisiono anticipe varbu kunlaborantojn por prepari la programon.

V.Sibircev: La dutendara sistemo devas resti. Oni havu eblecon

elekti taŭgajn kondiĉojn, do unu tendaro estu pli komforta, alia - malpli. Disciplinon necesas observi ĉie, precipe en urbaj kondiĉoj. Necesas pripensi, ĉu la tendaroj havu la saman programon aŭ ne. En la tendara programo devas esti libera tempo, uzebla por kuluaraj konversacioj.

A.Laur: Pri nia maldisciplinemo ni kulpas mem. Nur tri personoj havis naciajn kostumojn. Tre bone pasis la tradukista kurso. Necesas esplori, kiu kulpas pri abundo da "krokodiloj".

L.Kovalenko: Al mi plaĉis la ideo pri naciaj kostumoj. Tio iĝu tradicio. Necesas inviti al la tendaroj pli da spertaj mezaĝuloj.

D.Cibulevskij: De la kluboj, kulpaj pri krokodilado, necesas forpreni poentojn. Prepara Komitato invitis partopreni tiujn, kiuj laŭ Regularo ne rajtas partopreni.

V.Aroloviĉ: Ke absoluta plejmulto venis sen naciaj kostumoj, signifas, ke la amaso tion ne aprobas. Ne tiel ni montru nian internaciismon. Oni povas porti nacian kostumon laŭdezire, sed ne devige, kiel insistis poltavanoj.

M.Bronŝtejn: En la tendaro estis multaj hazarduloj, kiuj uzis la tempon por nura ripozado. Necesas pli kuraĝe puni iliajn klubojn.

V.Samodaj: La tendaroj estu diverstempaj, kun Konferenco inter ili. Tiam oni povos elekti oportunan tempon, kaj tiuj, kiuj havas pli longan forpermeson, sukcesos partopreni ĉie.

G.Gercikov: Se estus PP, ni ne havus problemon de krokodilado.

T.Bercis: En du tendaroj la lingva nivelo estas pli malalta, ol en unu, ĉar malmultas aktivuloj.

A.Ĥarkovskij: Du tendaroj estis nia eraro. Tio povas skismigi la movadon. Pro malfavoraj financaj kondiĉoj necesas, ke SEJM helpu al iuj kluboj partopreni tendaron. Devas esti sola unueca SEJT.

M.Bronŝtejn: Se ni faros unu tendaron, ĝi estos tro amasa - ĝis 400 - 500 personoj. La sperto montras, ke modela kvanto estas 150 - 200. Konferencoj estu apartaj kaj malfermitaj por perspektivaj komencintoj.

T.Bercis: Ĉi-jare en SEJToj estis sume nur iom pli ol 300 partoprenintoj. Sed eblas kolekti eĉ pli ol tian kvanton samloke. Ekz. BET, kiun ni organizis en lernejo, povus akcepti 400.

V.Sibircev: En tro granda tendaro ne eblas eĉ interkonatiĝi. Estus neregebla amasego.

M.Bronŝtejn: Estu ankaŭ grandamasa aranĝo, sed ĝi estu SEJM-Festivalo, ne tendaro. Kaj ni planu ĝin por 1979.

La Konferenco voĉdone decidas daŭrigi la dutendaran sistemon.

M.Bronŝtejn: Diference de SEJT - lernejo por komencantoj kaj aktivuloj - Festivalo devas esti observo de niaj fortoj. Ĝia programo devas enhavi amason da diversaj konkursoj, specialajn tagojn, tribunon de spertointerŝanĝo, modelan prelegejon k.a. Por ne dispolvigi la fortojn, en la festivala jaro SEJTojn ni ne organizu. Daŭro de la Festivalo povus esti 7 - 10 tagoj.

V.Cvetkova: Dum la Festivalo estu ankaŭ ekzameno "C".

Sekvas raportoj de Kluboj-Esplorantoj por 1978.

MAĤAĈKALA (A.Junusov). Kondiĉoj estas, sed mi dume ne povas priskribi ilin ĝuste. Post monato mi ekscios kaj informos per "A" aŭ "K". Por la preparado ni disponas nur pri 2 E-istoj.

NOVOMOSKOVSK (A.Kuprienko). Ankaŭ ni restis duope. Sed al ni promesis helpon komsomola komitato.

V.Aroloviĉ: Gravas, ke la tendaroj kaj precipe Konferenco estu aŭguste, post la Universala Kongreso en Varna.

BARNAUL (V.Kazanova). En Altajo abundas turismaj bazoj, kaj ni povus organizi bonan tendaron en tendoj.

KRASNOJARSK (A.Urdajev). Ni ne pretas organizi la tendaron en 1978, eble en 1979.

La Konferenco konfirmas kiel Klubojn-Mastrojn tiujn de Maĥaĉka-

la kaj Barnaul, kiel Klubojn-Dublantojn -tiujn de Novomoskovsk kaj Krasnojarsk.

M.Bronŝtejn: Eble la Festivalon ni planu por 1980? Tiam ni havus 1 jaron por esploro kaj 2 por preparado.

La Konferenco akceptas la proponon kaj komisias esplori eblecojn organizi Festivalon al la kluboj de Vilnius kaj Ufa.

Kiel Kluboj-Esplorantoj por 1979 estas registrataj Talgar, Krasnojarsk (ŌrSEJT) kaj Kievo (OkSEJT).

La 12-an SEJM-Konferencon estas decidite organizi en Barnaul.

Temo: Interna informado en SEJM.

V.Arolovič: Komencante la redaktadon de "A", mi klopodis konservi la tradician aranĝon de la enhavo, sed modifis la numeradon konforme al la agadjaro. Mi klopodis zorgi pri la ĝustatempeco, kaj gravaj malfruiĝoj, almenaŭ sur la redakta stadio, ne estis. La materialoj ne abundis, do mi devis utiligi preskaŭ ĉion venantan. La agadjara amplekso estis 114 paĝoj anstataŭ planitaj 120. Estis menditaj kaj aperis artikoloj de Samodaj, B.Kolker, Medinŝ, Novikova. Tre variigis la enhavon la vigla disputo "E. - celo aŭ rimedo?". Mi analizis la kontribuadon al "A" laŭ klubaj kategorioj. En la kategorio A kontribuis ĉiuj kluboj, kaj la plej aktivaj kontribuantoj - Riga (plej multe da problemaj artikoloj) kaj Krasnojarsk (plej multe da kontribuaĵoj por "Mozaiko") - apartenas al tiu kategorio. En la kategorio B neniel kontribuis 2 kluboj el 11 - Ivanovo kaj Meĵdureĉensk. En la kategorio C mi nenion ricevis por "A" el Kujbiŝev, Soĉi, Novomoskovsk, Kapsukas, Liepaja, Maĥaĉkala, Sterlitamak, Viljandi - duono de la kluboj de tiu kategorio. Same statas la afero inter la kandidatoj: silentis Magnitogorsk, Angarsk, Birsk, Kedainiai, Velikije Luki. Bone kontribuis al "A" subtenantoj, precipe mi volus noti aktivecon de V.Ĉernov el Kaluga. Pri "Kurte" mankas kunraporto de V.Ŝilas, do mi faris similan analizon laŭ la aperintaj numeroj de "K". Plej multe kaj regule (escepte Vilniuson mem) kontribuis la klubo de Tiĥvin. Ne estas materialoj de jenaj kluboj: Barnaul (A); Ustj-Kamenogorsk (B); Zaporoĵje, Ĉeljabinsk, Kapsukas, Liepaja, Maĥaĉkala, Sterlitamak, Viljandi (C); Magnitogorsk, Birsk, Velikije Luki (kandidatoj). Entute ne kontribuis al "K" 12 kluboj, al "A" - 15, al ambaŭ informiloj - 8 kluboj. Kelkaj anoncoj aperis kaj en "K", kaj en "A". Se la sciigo estas grava, ni toleru la duobligon, ĉar la aŭtoro anticipe ne scias, kiu informilo aperos pli frue. Por "K" taŭgas iom amuza stilo, kun humuraj desegnaĵoj ktp., sed "Aktuale" estas nia ĉefa organo kaj devas havi seriozan, akademian aspekton.

G.Gercikov: "A" estas tro oficiala, la redaktoro estas tro severa cenzuristo. "K" estas bonega, interesa, sed la titolo ne taŭgas. Necesas ĝin eldoni plu.

M.Bronŝtejn: Ni ankoraŭ ne tro fidas al "K". Necesas pli ofte sendi al ĝi urĝajn sciigojn. Do "K" aperu pli ofte, "A" - pli malofte.

V.Sibircev: La nuna sistemo estas tute bona. La redaktoro de "A" agas laŭdinde.

V.Noĉovkin: "K" aperu pli ofte, se estas sufiĉe da materialo.

A.Ĥarkovskij: Al mi plaĉas "K", sed "A" ne plaĉas. "A" devas levi disputindajn demandojn, proponi temojn por diskutoj, Cenzurado de la kontribuaĵoj devas esti.

V.Kulikov: La lingva kaj enhava nivelo de "A" estas altaj. "A" eĉ monata iam tro longe ne venas, do dumonata apenaŭ taŭgas. La eldonadon de "K" necesas daŭrigi.

La kvara tago - 16.8.77.

Temo: Financa raporto.

D.Cibulevskij: Dum la agadjaro estas ricevitaj kotizoj: de la kluboj 462 rub., de la klubaj subtenantoj 200 rub., de individuaj subtenantoj 847 rub. Por la sekva agadjaro jam estas ricevitaj 280 rub. Estis disvenditaj E-aĵoj por 77rub. La plej grava fonto de enspezoj estis la profito de SEJT-18: 2791 rub.; krome venis la profito de CRRER-15: 96rub. Elspezoj de SEJM dum la agadjaro estis: multobligo de "A" - 663 rub., "K" - 121 rub., Adresaro de SEJT-18 - 63 rub., Jarlibro - 120 rub.; ekspedado de "A" - 90 rub., "K" - 141 rub., nova SEJM-Pokalo - 70rub., entute sekretariaj elspezoj - 1496 rub.; multobligo de materialoj por OkSEJT-19 kaj de STF-bultено - 480 rub.; aĉeto de E-aĵoj por tendaraj butikoj - 158 rub.; elspezoj de Terminologia Centro - 302 rub. Nun en la kaso estas ĉ. 2200 rub., alia mono situas ĉe diversaj SEJM-aktivuloj. La jara profito konsistigis ĉ. 4000 rub. (Ĉiuj kostoj, menciitaj en la raporto, estas proksimumigitaj ĝis plenaj rubloj. - La red.)

T.Bercis: Necesas investi SEJM-monon por aĉeti bezonatajn varojn.

D.Cibulevskij: SEJM jam havas multon: tajpilon, du tendojn k.a.

G.Gercikov: Necesas aĉeti multajn tendojn, kiuj poste donus al ni konstantan profiton.

V.Sibircev: SEJM aĉetu magnetofonon, pli elspezu por eldonado.

M.Bronŝtejn: La aĉetojn necesas plani. Necesas elekti novan revizoron de SEJM. Kelkaj fakoj emas al financa memstareco. Tion ni limigu, la SEJM-kaso estu unueca.

V.Kulikov: En SEJM estu serioza financa disciplino, ĉar iuj prunteprenas SEJM-monon kaj ne raportas.

V.Bespalov: SEJM ne povas aĉeti tro multe. Ekz., magnetofonojn prefere aĉetu la kluboj mem por siaj E-kursoj.

V.Aroloviĉ: Apartaj fakaj kotizoj tute ne estas evitindaj, ilin kolektas la plej agemaj fakoj. Do ni rajtigu la fakojn memstare prizorgi siajn monbezonojn, kondiĉe ke ili el la centra kaso monon ne petos, sed pagos al ĝi ioman procenton de sia kotizaro.

V.Sibircev: Tion povus nur kelkaj fakoj. La ceteraj prenu la necesan monon el SEJM-kaso.

G.Gercikov: Anstataŭ revizoro devas esti revizia komisiono.

A.Harkovskij: Ni tro burokratigas la aferojn.

Sekvas malfruinta raporto de Metodika fako.

S.Smetanina: Mi kompilis helpmaterialon por Paroliga Periodo, sed nur en unu ekzemplero. Al Miass mi ĝin ne sendis, ĉar tie estis sufiĉe spertaj E-istoj. La fakon necesas unuigi kun la lerneja. La unuigita fako devus organizi metodikan konferencon dumjare. Estas komencita laboro pri pedagogia terminaro.

V.Kulikov: Devas esti helplibro pri metodiko.

E.Perevertajlo: Manko de unueca programo malhelpis al PP en OrSEJT. Necesas, ke ĉiuj grupoj ricevu la samajn sciojn. Iom da materialoj ni ricevis, sed ne de Metodika fako.

G.Gercikov: Unueca programo ne necesas, ĉar ĉiu instruisto havas propran metodikon. Estu nur komunaj postuloj. La ĉefa tasko de la unuigita fako devas esti kreo de korespondaj kursoj.

Temo: Sekretaria raporto.

P.Jegorovas: Dum la agadjaro registriĝis 84 individuaj kaj 10 kolektivaj subtenantoj de SEJM. Tio estas je 20 personoj pli ol pasintjare, tamen iom malpli, ol ni planis (100).

La rezultoj de la socialisma konkurado estas jenaj:

En la kategorio A: 1. Klaipeda - 1814; 2. Riga - 1732; 3. Krasnojarsk - 1393; 4. Ufa - 1350; 5. Vilnius - 1022; 6. Leningrad - 850; 7. Poltava - 721; 8. Barnaul - 468.
En la kategorio B: 1. Tjumenj - 1189; 2. Moskvo - 982; 3. Miass - 645; 4. Tiĥvin - 593; 5. Ivanovo - 531. 6. Ĥarkov - 506; 7. Rostov-Don - 462; 8. Doneck - 337; 9. Ustj-Kamenogorsk - 259; 10. Meĵdureĉensk - 256; 11. Ĥmelnickij - 155.
En la kategorio C: 1. Omsk - 1046; 2. Kievo - 962; 3. Salavat - 558; 4. Zaporoĵje - 397; 5. Novosibirsk - 340; 6. Soĉi - 324; 7. Ĉeljabinsk - 309; 8. Talgar - 302; 9. Kaunas - 301; 10. Sizranj - 294; 11. Kujbiŝev - 270; 12. Novomoskovsk - 133; 13. - 17. Kapsukas, Liepaja, Maĥaĉkala, Sterlitamak, Viljandi - 0.
Inter la kluboj-kandidatoj 1. Permj - 342; 2. Angarsk - 328; 3. Petropavlovsk-Kamĉatskij - 128; 4. Magnitogorsk - 127; 5. Siktivkar - 65; 6. - 10. Birsk, Kedainiai, Tallinn, Tula, Velikije Luki - 0.
La Komitato decidis premii la klubon de Klaipeda - per la transira SEJM-pokalo, senpaga restado en SEJT por 1 persono kaj librodonaco; la klubojn de Riga kaj Krasnojarsk - per valoraj librodonacoj; Tjumenj - senpaga restado en Konferenco por 1 persono kaj librodonaco; Omsk - librodonaco; Permj - librodonaco. Ĉiuj librodonacoj estas sendotaj al la kluboj post ricevo de la atendataj libroj el Hungario.
Necesas ioma klarigo pri la poentoj de Poltava. Tie estas du kluboj: klubo-membro (SEJM-reprezentanto V.Noĉovkin) kaj klubo-subtenanto (gvidanto V.Grigorenko). Raportis ili aparte, sed por la unua duonjaro mi sumigis ambaŭ raportojn. Nun la Komitato rekonsideris tion, ĉar kluboj-subtenantoj en la konkurado laŭ la Regularo partopreni ne rajtas. Do estas kalkulitaj nur la poentoj de la klubo-membro. Tamen, konsiderante, ke ankaŭ la klubo-subtenanto raportis, la Komitato notis tion kaj decidis premii ĝin kiel la plej aktivan inter la kluboj-subtenantoj.
Reprezentantoj de kelkaj kluboj plendas pri nekalkulo de unikaj aktivecoj. Necesas kompreni, ke ne ĉio mankanta en Taksa Demandaro estas unika aktiveco.
V.Kulikov: Ni ne marĉandu pri poentoj. Gravas ja laboro mem.
V.Cvetkova: Necesas poentigi ĉiujn laborojn, por ne ofendi la klubojn.

Temo: Kandidatigo de novaj kluboj al SEJM.

LVOV (P.Jegorovas, komisie de la klubo). La klubo proponas sin por kandidatiĝi al SEJM. Estas preparita raporto laŭ Taksa Demandaro, kie estas aktivecoj por preskaŭ 500 poentoj.
La Konferenco decidas kandidatigi la klubon.
JEREVAN (D.Cibulevskij, komisie de la klubo). La klubo petas kandidatiĝon. Oni plenumas diversan laboron, intencas organizi renkontiĝon.
Estas akceptata decido kandidatigi la klubon.
PÄRNU (A.Toomsalu). La klubo havas 15 membrojn, agas laŭ laborplano. Estas deziro kandidatiĝi al SEJM.
Oni unuanime decidas pri la kandidatigo.

Temo: Reelekto de la SEJM-Komitato kaj fakestroj.

M.Bronŝtejn: Estas propono lasi la saman postenkonsiston en la Komitato.
A.Ĥarkovskij: Mi proponas aldone elekti 2-3 personojn sen certa agadsfero, sed kun ĉiuj rajtoj de komitatanoj, por anstataŭi la aliajn en necesaj okazoj.
D.Cibulevskij: Prefere la Komitato rajtu koopti laŭbezone.
La Konferenco akceptas voĉdone la proponon de Cibulevskij.

Oni elektis la Komitaton en jena konsisto: prezidanto - A.Melnikov (Rostov-Don), unua vicprezidanto - A.Medinŝ (Riga), vicprezidantoj pri: sekretariaj aferoj - P.Jegorovas (Vilnius), financaj aferoj - D.Cibulevskij (Ĥarkov), fakaj aferoj - V.Sapoĵnikov (Krasnojarsk), renkontiĝoj - L.Novikova (Miass), interna informado - V.Aroloviĉ (Moskvo).

En la konsisto de la fakoj kaj servoj la Konferenco decidis pri jenaj ŝanĝoj: Kanta kaj Poezia fakoj estas unuigataj al Belarta fako; Lernaja kaj Metodika - al Instrua fako; estas likviditaj Naturamika fako (kun transdono de la taskoj al Scienc-teknika fako) kaj provizore Sociologia; la titolo de Propaganda fako estas ŝanĝita al Populariga; estas fondita Fotoservo.

Kiel estroj de la fakoj kaj servoj estas elektitaj: Bibliografia - V.Cvetkova (Leningrad), Historia - A.Ĥarkovskij (Moskvo), Belarta - M.Bronŝtejn (Tiĥvin), Kolektanta - V.Baniulaitis (Klaipeda), Korespondа - S.Neilande (Riga), Instrua - S.Smetanina (Ivanovo), Magnetofona - S.Gaidamaviĉius (Vilnius), Populariga - A.Kuprienko (Novomoskovsk), Scienc-teknika - A.Gonĉarov (Barnaul), Traduka - V. Ebel (Barnaul), Interlingvistika - B.Kolker (Ufa), Fota - V.Grebenjuk (Miass).

Estas decidite elekti revizian komisionon en la konsisto: A.Toomsalu (Tartu) - prezidanto (la revizoro de SEJM), V.Bespalov (Soĉi), T.Bercis (Riga) - membroj de la komisiono.

Kiel redaktoro de "Kurte" estas konfirmita V.Ŝilas (Vilnius).

<u>La kvina tago - 17.8.77.</u>

<u>Temo</u>: Perspektiva laborplano de SEJM.

<u>A.Melnikov</u> voĉlegis projekton de la plano, ellaboritan de la Komitato.

La Konferenco akceptis la projekton kiel bazon.

<u>V.Sibircev</u>: Necesas antaŭvidi punktojn pri klopodoj reeldoni la lernolibrojn kaj vortarojn. Krome indas esplori vojojn por eldoni E-revuon.

<u>A.Kilk</u>: Necesas pli da atento al instruado. La plano estu detaligita laŭ jaroj.

<u>V.Sibircev</u>: Tre gravas la soci-utila agado, kiu mankas en la plano. Ĝin ni nepre akcentu.

<u>V.Aroloviĉ</u>: Indas enmeti la proponon de Gercikov pri korespondaj kursoj, ke estu tutlanda reto.

La Konferenco aprobas la planon kun la proponitaj ŝanĝoj kaj aldonoj.

Al la venkinto de la socialisma konkurado - la klubo de Klaipeda estas enmanigata la transira SEJM-Pokalo.

<u>P.Jegorovas</u> voĉlegis projekton de Decidoj, al kiu oni faris aldonojn kaj precizigojn.

Sekvis interŝanĝo de opinioj pri la Konferenco kaj OkSEJT.

<u>A.Melnikov</u> anoncis fermon de la Konferenco.

Protokolis: V.Kazanova (Barnaul)
M.Gaidamaviĉiene (Vilnius)
A.Silantjeva (Ufa)
T.Aŭderskaja (Odessa)

---

EN LA SEKVA NUMERO

- Decidoj de la 11-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro
- Perspektiva 5-jara laborplano de SEJM, aprobita de la Konferenco

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 25.9.77.
Ĉiujn materialojn por "A" sendu al: 121019 Moskvo d/v, AroloviĉuV.S.